

## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Informilo de „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo

## **ÉSZAKMAGYARORSZÁGI HÍR**

A „Király Lajos” Eszperantó Baráti Kör Tájékoztatója

2006. Január  
Januaro 2006.



Januárban rövidek a nappalok. Fúj a szél, esik, havazik. Kellemessé tehetjük a téli napokat például nagy sétákkal a tiszta levegőn, kihasználva a téli napozás lehetőségét. A ködös napokon viszont jól esik ücsörögni egy szaunában. A forráság átjárja szervezetünket és a lelki gubancok mintha oldódnának bennünk. Amikor felfrissültünk, igyunk egy csésze teát! Ezek olyan apróságok, melyek megállítanak bennünket rohanó világunkban, hogy kicsit magunkkal is foglalkozhassunk. A nagy téli séták idején élvezzük a téli kék égboltot, a hó szűzes fehérségét, a csendet, nyugalmat. Az alvó természetet. Aki teheti, sétáljon, szánkózzon, korcsolyázzon vagy sízzon. A mozgás jó hatású az emberi szervezetre.



En januaro mallongaj estas la tagoj. Blovas la vento, pluvos, neĝas. Ni fareblas la vintrajn tagojn agrablaj, ekzemple kun grandaj promenadoj en freŝa aero eluzante la eblecon de la vintra sunbano.

Sed, kiam nebulo estas la ĉielo, pli bone estas sidadi en saŭno. La varmego trapenetas nian organismon kaj la animaj zorgoj ŝajnas kvazaŭ malaperi for de ni.

Kiam ni refreŝiĝis, ni trinku glason da teo!

Ĉi tiuj estas bagatelaĵoj, kiuj haltigas nin en nia rapide pasanta mondo, ke ni povu okupiĝi kun ni mem. Dum la vintra promenado ni ĝuu la bluecon de vintra ĉielo, ties virgan blankecon, la silenton, trankvilon, la dormantan naturon.

Kiu povas, tiu skiu, glitu, sledu, kuru, naĝu. La movo bonefikas al la homa organismo.

## Január nevezetes hónap

1823. Január 1-én született a nagy magyar 19. századi költő Petőfi Sándor, akinek verseit az ugyancsak nagy magyar eszperantista költő, Dr. Kalocsay Kálmán fordította eszperantó nyelvre és ismertette meg így a világgal.

1875. január 14-én született Albert Schweitzer, aki 1952-ben Nobel-békedíjat kapott.

1891. Január 13-án született Baghy Gyula, a magyar és eszperantó nyelven író költő, író és eszperantó nyelvtanár, színész, rendező.

## Januaro estas memorinda monato

La unuan de januaro 1823 naskiĝis la granda, mondfama 19-a jarcenta hungara poeto Aleksandro Petőfi, kies poemojn la same fama hungara poeto D-ro Kálmán Kalocsay tradukis je Esperanto, kaj ekkonigis tiujn kun la homaro.

La 14-a de januaro 1875 naskiĝis Albert Schweitzer, kiu ricevis en 1952 Nobel-pacpremio pro sia agado.

En januaro, la 13-an en 1891 naskiĝis la same fama hungara poeto, verkisto, Esperantolingvoinstruisto, aktoro kaj teatra reĝisoro: Julio Baghy.



## Baghy Gyula élete

**Baghy Gyula** 1891. január 13-án született Szegeden. Nagyszülei és szülei színészek voltak. Apja drámai színész, édesanyja színházi sűgónó volt. Iskolai tanulmányai után ő is színész, majd színi rendező lett különböző színházaknál.

Még 1911-ben, amikor a kassai színháznál dolgozott, oda utazva hallott az Eszperantó nyelvről, jelentőségéről. A nyelv bensőséges eszméje rabul ejtette őt.

A világháború összetörte karrierjét. Hat évet töltött távol hazájától, Szibériában :

orosz hadifogságban. Még fiatal korában sok magyar nyelvű költeménye, novellája jelent meg magyar újságokban. Kiterjedtebb eszperantista működése már a szibériai hadifogolytáborban kezdődött, ahol sok eszperantó nyelvtanfolyamot vezetett különböző nemzetbeliek számára. Onnan hazaérkezve Magyarországra, a háború után az E-mozgalom egyik fő vezetőjévé vált. Sok, különböző szintű tanfolyam, E-baráti kör vezetője lett. Irodalmi esteket rendezett, ...stb. Több egyetemes kongresszuson volt színész is, rendező is a kongresszusi színda-

rabokban. A nemzetközi E-mozgalom újjászervezésére részletes javaslatokat dolgozott ki: „Publika Letero”-1931- címmel.

Baghy Gyula sokat tett azért, hogy az eszperantisták beszédképességének szellemi színvonalát emelje, amelyre az a kezdeményezése is irányult, mely szerint Zámenhof születésnapja az Eszperantó-könyv napja legyen.

Mint Cseh-módszer szerinti tanár vezetett tanfolyamot Észtországban, Lettországban, Hollandiában, Franciaországban és még máshol is. A háború utáni lehangoltság után sokszorozott erővel hangzott egyéni új dallam gazdag költészete. Első verses gyűjteménye a *Preter la vivo/1922/* új útját mutatta be az eszperantó költészetnek.

Számos verset, novellát, színdarabot írt.


Az egyik legszebb verse: A „Nyelvünkhöz” című.

Baghy Gyulát, költészete alapján, az Eszperantó nyelv Petőfijének nevezik

Életfelfogását mi sem tükrözi jobban, mint híressé vált jelmondata:

„A SZERETET BÉKÉT TEREMT, A BÉKE SZERETETE TARTALMAZZA AZ EMBER-SÉGET, AZ EMBERSÉG A LEGNAGYOBB IDEALIZMUS! „

Baghy Gyula 1967-ben halt meg. A Fiumei úti temetőben van a sírja Budapesten.



### Vivo de Julio Baghy

**Julio Baghy** hungara poeto, verkisto kaj Esperanto lingvoinstruisto, aktoro, reĝisoro estis. Li naskiĝis la 13-an de januaro en 1891, en urbo Szeged..

Jam ankaŭ siaj gevoj kaj gepatroj estis aktoroj. Lia patro estis drama aktoro, la patrino sufloristino. Post siaj lernejoj studoj ankaŭ li iĝis aktoro kaj reĝisoro ĉe diversaj teatroj.

Ankoraŭ en 1911, kiam li laboris en teatro de urbo Kassa (nun Košice), tien vojaĝinte li aŭdis pri Esperanto. La belsona ideo de la lingvo forrabis lian animon.

La unua mondmilito rompis lian karieron kaj li pasigis ses jarojn for de sia patrujo, en siberia rusa militkaptiteco. Ankoraŭ dum sia junaĝo multaj liaj poemoj, noveloj aperis hungarlingve

en diversaj hungaraj gazetoj. En 1911 li konatiĝis kun Esperanto kaj ties interna ideo tuj forlogis sin por la Esperanto-literaturo.

Dum sia siberia militkaptiteco li aŭdis la mortfamon de L.L.Zamenhof. Li verkis kortuŝan poemon el tiu okazo.

Julio Baghy

### LA MAJSTRO MORTIS

Ne estis mi tie,  
Preĝante plorpie,  
Katenis min sklave Siberio.  
La famon ne brue,  
Nur poste, malfrue,  
Simile al eĥo de mortkrio  
Mallonga sciigo alportis:  
„La majstro mortis!”

Sed scias mi sente,  
Ke oni sensente  
Plezurojn pelante babiladis,  
Eĉ kiam lorante  
la ĉerkon portante  
amaso funebra trapaŝadis.  
Mallonga sciigo alportis:  
„La majstro mortis!”

Por ili, jen homo,  
Eĉ malpli – nur nomo  
Sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko...  
Por ni, funebrantoj,  
Por pacbatalantoj,  
Ĝi gardas kreinton de mondverko.  
Mallonga sciigo alportis:  
„La majstro mortis!”

/Nikolsk- Ussurijsk//El Preter la Vivo, titola poemaro, 1922/

Lia ampleksa agado komenciĝis jam en la siberia militkaptitejo, kie li gvidis multajn lernokursojn por diversnaciaĵoj. Reveninte en Hungarion post la milito li iĝis unu el la plej ĉefaj gvidantoj de la Esperanto-movado. Multaj diversgradaj lingvokursoj, gvidado de E-amikaj rondoj, aranĝaĵoj de literaturaj vesperoj... ktp ligiĝas al lia persono.

Dum pluraj UK-oj li estis aktoro kaj reĝisoro de la kongresaj teatraĵoj. Por la reorganizo de la internacia E-movado li ellaboris detalan proponon, en la: PUBLIKA LETERO titola verko, en 1931.

Julio Baghy faris multe por plialtigi la spiritan nivelon de la esperantistaro. Tion celis ankaŭ lia iniciato, laŭ kio la naskiĝtago de L. L. Zamenhof iĝis la Tago de la Esperanto-Libro.

Kiel Cseh-metoda instruisto li gvidis lingvokursojn en Estonio, Latvio, Nederlando, Francio, kaj ankaŭ en aliaj landoj.

Post la unua mondmilita apatio kun multobligita forto eksonis lia individua, nova, melodiŝa poezio. Lia unua poemaro /Preter la Vivo – 1922/ montris novan vojon de la Esperanto-poezio.

**Liaj verkoj estas:**

Preter la Vivo /poemaro/, Viktimoj /romano/, Pilgrimo/Poemaro/, Dancu Marionetoj/ Originala Novelaro/, Migranta Plumo/ poemoj kun prozoj, tradukoj multkoloraj/, Hura/originala romano/, Printemo en Aŭtuno/melankolia rakonto/, La Vagabondo Kantas / originale verkitaj versoj/, Verdaj Donkiĥotoj / li majstre fotografas la vivon per liaj skibitaj pensoj/, La Teatra Korbo /la verko havas aŭtobiografian karakteron/ , Sur Sanga Tero/ originala romano/, La Verda Koro/ facila romaneto estas/, Songe sub Pomarbo/ lirika komedio estas/, Koloroj/ 9 karaj noveloj, verkitaj en diversaj periodoj/, Lernolibroj/ eldonitaj en 40000 ekzempleroj/, Ĉielarko /originale verse reverkitaj opolfabeloj/ estis la laste eldonita libro en 1966.

Liajn verkojn karakterizas tiu tendenco, kiun esprimas lia devizo:

„AMO KREAS PACON, PACAMO KONSERVAS HOMECON, HOMECON ESTAS LA PLEJ ALTA IDEALISMO.”

Unu, el liaj plej belaj poemoj estas:

AL NIA LINGVO

Vi, bela lingvo, Esperanto,  
En mi la penso jam ne mutas,  
Parolas sentoj en la kanto,  
Per kiu vin mi nun salutas.

Ho, kie estas via lando? –  
Demandas homoj. La respondo  
La lingvoland' de Esperanto  
Jam estas nia tuta mondo!

Al tuta mond' vi apartenas,  
Al alto levas vi la Homon  
Kaj kiu vin en koro tenas,  
de vi ricevas Belon, Bonon.

En homan mondon venas Amo  
Per Nova Sento, kormuziko,  
Vi faras Pacon el malamo  
Kaj fraton el la malamiko.

Vi donas al mi Esperanto,  
Kulturon novan kaj laboron...  
Sed kion donu mi, lernanto?  
Akceptu mian tutan koron!

/ Verda Koro/

Julio Baghy mortis, la 17-an de marto en 1967. Li estas entombigita en la budapeŝta Fiumei strata tombejo.

## Miért jó a szauna?

A finnek tudják, hogy mi a jó. Kint hideg és sötét van, de a szaunában jó ücsörögni a forróságban, elfelejtve gondokat, gyötrelmeket az izzadás által. A szaunázás művészetében – habár a finnek szerint a szaunának lelke és szelleme van – nincs semmi mágia, bárki megtanulhatja és bármikor elkezdheti.

A szaunába akik nem tudnak elmenni, azokat elviszik. Így például a kisgyerekeket és a tolokocsis rokkantakat. De természetesen a kerekesszékek kint maradnak.

A régi időkben a finn asszonyok szültek is a szaunában, mert ott lehetett kapni meleg és tiszta vizet.

A lucfenyő jó építőanyag, mert az nem melegedik úgy, mint az erdei fenyő vagy a nyírfa. A padokat rezgőnyárfából vagy más külföldi faanyagból készítik. Ez kevésbé melegedik fel, és ezért kellemesebb rajta ülni. Körülbelül egy óra a fűtése. Általában fával fűtik, de előfordul az elektromos fűtés is.

Általában 10-15 db ökölnyi kő van a tartóban, melyet időnként 1 – 2 dl vízzel meglocsolnak. A gőzzé váló víz kellemes levegőt és hangulatot teremt. De a gőz csak a vízöntés pillanatában látható. A török típusú szaunában a gőz betölti az egész helyiséget és egész idő alatt látható.

Zuhanyozó és öltözőkabin tartozik hozzá. A szauna tulajdonképpen három részből áll. Van az úgynevezett: forró „szauna szobácska”, a mosdó a zuhanyozóval, és az öltöző szobácska. Tusolót nem használ mindenki. Szívesebben alkalmazzák csak a mosdó medencét, vagy a közeli tóban, vagy a tengerben fürödnek meg, vagy a hóban meghempergőznek. Vannak olyan emberek is, akik télen is megfürödnek a tó vagy a tenger vizében, sőt pontosan az erre a célra létesített, a jégből kivágott léken át. A szaunázás a forró levegő által kitágítja az ereket, megizzadunk, eltávoznak szervezetünkben a salakanyagok. Utána a hideg zuhany összehúzza a pórusokat, lezárva az utat a vírusok és baktériumok előtt.



A szaunázás szabályai:

Csak akkor menjünk szaunázni, ha erre van elég időnk! Legalább egy óra, vagy valamivel kevesebb.

Nem jó túl sokáig ülni a forróságban. Egy tanács 5 percről szól, de ez függ magától az embertől, hogy mi a jó neki. Óra nincs a szaunában. Vannak, akik csak néhány percig maradnak.

Szaunázás előtt zuhanyozzunk!

Közvetlenül étkezés után, vagy alkohol hatása alatt, vagy lázas állapotban ne szaunázzunk!.

A szauna szobában tegyük magunk alá törülközőt, mert a pad túl forró lenne rajta ülni nélküle.

És azért is, mert a padon csupaszon ülnek. Az a szokás, hogy a család együtt szaunázik. Helyenként a serdülő lányok külön az anyjukkal, a fiúk az apjukkal szaunáznak, de ez nem általános. A közösségi helyeken pl: fürdőhelyen vagy uszodában, vannak külön szaunák.

férfiak és nők számára, ahol tilos a fürdőruha használata. És ezeken a helyeken külön idő van meghatározva a férfiak és külön a nők számára. Csak kivételes alkalmakkor lehet fürdőruhát használni.



A szaunázás nyugalmat igényel! Ne idegeskedjünk, ne veszekedjünk!

Ha használni akarunk illatos olajat, kérdezzük meg társainkat udvariasan, kedvelik-e a mi olajunkat!

Figyeljünk arra, hogy a szaunában mindig 75-90 Celsius fok meleg és 9-22 % páratartalom legyen, e miatt az Ön fürdőruháján ne legyenek fém részek! Természetesen ez a török típusú „gőzszaunára vonatkozik és arra, ha Ön nem Finnországban, hanem valahol máshol Európában szaunázik.

Mert a finneknél a fokokra nincs kötelezés. Van, aki csak 70 fokot használ, van aki 100 fokban szaunázik. Mindig

magától az embertől függ, hogy mennyit visel el, mennyi a kellemes a számára.

A gőzmennyiségre mérőeszköz általában nincs a finn szaunákban. Csak a lakások gőztartalmának mérésére szolgáló eszköz van.

Egyébként, a szaunázáshoz tökéletesen elég a 10 – 15 darab kő lelocsolásához szükséges vízmennyiségből származó gőz.

Európában sok szállodában és fürdőhelyen van szauna, de azok nem mindig finn típusúak.

Ezidőben Finnországban is többfélék a szaunák aszerint, hogy azok különálló építmények-e, vagy az emeletes házban vagy a családi házban benne vannak-e. A modern emeletes házakban minden apartmanhoz van kicsi szauna, de a régebbiekben közös szaunák vannak. Ezeket előre meghatározott időre a család számára le kell foglalni hetenként. Mostanában sokan építik a szaunát úgy, hogy az nem különálló, hanem összeépül a hétvégi házzal. Annak feltétlenül víz közelében kell lennie. A kályhát, melynek neve „kiuxas” vagy fával, vagy villannyal fűtik. Van olyan családi ház, ahol a pincében van a szauna/ Pl: Veli és Sylvania Hämäläinenéknél is / elektromos fűtéssel, de a hétvégi házukban fával fűtenek. At utóbbi kellemesebb, lágyabb.

Szaunázás után sok folyadékot fogyasszunk!

Sylvia Hämäläinen /Tampere, Finnország/ levele alapján írta a Pásztor házaspár



## Kial estas bona la saŭno?

La finnoj scias, kio estas bona. Ekstere estas malvarme kaj malhele, sed interne en la saŭno en la varmego bona, agrable estas sidadi forgesante la zorgojn, skrupulojn pere de la ŝvitado.

En la arto de la saŭnado - kvankam laŭ la finnoj la saŭno havas animon kaj spiriton – ne estas magio, kiu ajn kapablas lerni tion kaj kiam ajn povas komenci.

En la saŭnon oni portas tiujn, kiuj ne povas tien promeni. Ekzemple la beboj kaj la invalidoj en rulseĝoj. Sed nature ĝi restas ekstere.

En la malnovaj tempoj oni naskis en saŭno, ĉar tie eblis ricevi varman kaj puran akvon. Piceo estas bona konstrumaterialo, ĉar ĝi ne varmiĝas tiel, kiel pino aŭ betulo. La benkojn oni faras el tremolo aŭ el alia eksterlanda ligna materialo. Kiu varmiĝas malpli, kaj sur kiu estas pli agrable sidi. Oni hejtas per ligno, sed okazas ankaŭ elektra hejtado. En la ujo kutime estas 10 – 15 ŝtonoj je grandeco de pugno. Tiujn oni hejtas proksimume unu horon, dume verŝas sur ilin 1 – 2 dl da akvo. La akvo vaporiĝas kaj faras la etoson agrabla. Sed la vaporon oni vidas nur en la momento verŝante la akvon. En la turka saŭno la vaporo plenigas la ejon kaj vidiĝas tutan tempon. Al la saŭno apartenas duŝo kaj vestobudo. La saŭno konsistas el tri partoj: la varmega „saŭnoĉambro”, lavejo kun duŝo kaj ĉambreto por sinvesti. Ne ĉiuj uzas duŝon, oni uzas nur lavpelvojn, aŭ iras al la proksima laĝeto, aŭ en la maron, en kio oni banas sin, aŭ ruliĝas en la neĝo. Estas homoj, kiuj eĉ banas sin en vintro en lago- aŭ marakvo tra por tio farita truo en la glacio. Saŭnado pere de la varmega aero plivastigas niajn angiojn, ni ekŝvitas kaj multe da skorioj foriras el nia korpo. Poste la malvarma duŝakvo kuntiras la polusojn, fermante la vojon antaŭ la virusoj kaj bakterioj.



La reguloj de la saŭnado:

Nur tiam ni iru saŭnadi, se ni havas sufiĉan tempon por ĝi! Oni uzas ĝenerale unu horon, aŭ malpli. Dependas de tio kiom ofte ni refreŝiĝas en la lavejo aŭ ekstere ĉe la domo, se estas varme ke oni povas tie sidi. Ne estas bone sidi tro longe en la varmego. Iu konsilo temas pri 5 minutoj, sed tio dependas de la homo mem, kion tiu sentas bona. En la saŭno ĝenerale ne estas horloĝo. Kelkaj homoj restas tie longe, kelkaj nur por momento.

Antaŭ saŭnado ni duŝu!

Rekte, tuj post manĝo, aŭ ebrie, aŭ en febra stato ni ne iru saŭnadi!

En la saŭno - ĉambreto ni metu viŝtukon sub nin, ĉar la benko povas esti tro varma pro varmego por sidi sen ĝi. Kaj tial, ĉar oni sidas nuda / en la finnlandaj familiaj saŭnoj / . Estas kutimo, ke la familio kune saŭnadas. Estas lokoj, kie la pubertaj knabinoj kune kun siaj patrinoj, la pubertaj knaboj kune kun patro saŭnadas, sed tio ne estas ĝenerala kutimo. Sed en la komunaj lokoj, ekz. banejo aŭ naĝhalo, estas apartaj saŭnoj por viroj kaj por virinoj, estas malpermesate surhavi naĝkostumon en la saŭno. Kaj en tiuj lokoj estas apartaj tempoj por viroj kaj por virinoj. Nur en esceptaj okazoj oni iras en naĝkostumo.

La saŭnado bezonas paciencon, trankvilon! Ni ne estu nervozaj, ne kverelu!

Se ni volas uzi bonodoran oleon, unue demandu ĝentile niajn gekunulojn, ĉu ankaŭ ili ŝatas ĝin, aŭ ne!



Atentu pri tio, ke en la vaporsaŭno estas ĝenerale ĉiam 75-90 gradoj laŭ Celsius kaj 9-22 % da vaporenhavo. Pro tio sur via banvestaĵo ne estu metala aĵo se vi saŭnadas ne en Finnlando, sed ie alie en Eŭropo.

Sed, la gradoj ne estas iu devo. Multaj ŝatas havi ĉ. 70 gradojn, sed estas homoj, kiuj nepre saŭnas en 100 gradoj. Dependas de la homo mem. Pri kvanto de la vaporenhavo ne estas devigo, sed oni ja devus havi iun mezurilon por tio kaj tia ne ekzistas por finna saŭno. Nur por loĝĉambroj estas.

Sed la granda vaporo ekzistas nur en la turktipaj, en la tn: „vaporsaŭnoj”!

Post la saŭnado ni trinku multe da likvaĵo!

En Eŭropo multloke ekzistas saŭnoj en hoteloj kaj en banlokoj. Sed, ili ne ĉiam estas finntipaj.

Nuntempe ankaŭ en Finnlando la saŭnoj varias laŭ tio, ĉu ili estas apartaj konstruaĵoj aŭ ene de etaĝdomo aŭ familia domo. En la modernaj etaĝdomoj ekzistas malgranda saŭno en ĉiu apartamento, en la iom pli malnovaj estas unu komuna, kiun oni povas rezervi por sia familio por certa tempo semajne. Nuntempe multaj konstruas saŭnon ene en la somerdometo, kaj ne aparte. Ĝi nepre devas lokiĝi apud akvo. La fornon, kiu nomiĝas „kiuxas”, oni hejtas aŭ per elektro aŭ per ligno. En hejmo de Veli kaj Sylvia Hämäläinen la saŭno estas en la kelo kun elektra hejtado, sed en la somerdometo ili havas saŭnon en aparta konstruaĵo, hejtitan per ligno. La lasta estas pli agrabla, mola.



La glumarkon faris Maritta Wendelin (1893-1986)  
Pentristino, grafikistino, tre konata estas en Finnlando

Laŭ informoj de Sylvia Hämäläinen / Tampere- Finnlando / verkis geedzoj Pásztor

## MAGYARORSZÁGI KIRÁNDULÁSOK

### Diósgyőr: a vár és környékének rövid története

#### Második rész



A hatalmas vár árnyékában fekvő apró falut először 1248-ban említették az írások. Akkor, még a neve Noggeur volt és királyi birtok. 1366-ban a neve Disgwyr lett. 1704-ben egy magyar nyelvű okiratban Diós Gyür.

A 19.században általános lett a Diósgyőr név.

Tompa Mihály története Diós Pál álmáról, aki kincskeresés közben művelt és gazdag tájat talált, természetesen csak legenda. A falu lakosai a várurak szolgálatában dolgoztak, többségük nincstelen jobbágy volt.

Közben a lakosok egyre módosabb polgárok lettek, és ellentétbe kerültek a szőlő és gyümölcsösök gazdáival és a pálos

szerzetesekkel. Főleg nagyon szenvedett a lakosság a mohácsi vész után a mohó és kegyetlen Balassa Zsigmondné : Fánchy Borbálától.

A 18. században a várat és a községet a koronauradalom birtokolta. A lakosság a községben és a környékén erdészettel, üveg és vasgyártással foglalkozott, papír és fűrészüzemmel rendelkeztek. De a latifundium működési területe lassan csökkent, annak utolsó képviselője Déry István / a híres magyar színésznő Széppataki Rozália férje/ volt.

Miskolc közelsége és a vasgyár felépülése a 20. század elején fellendítette Diósgyőr életét. Faluház, iskolák épültek, fürdőt vásároltak és megvalósult a villamos vonala is.

Az első világháború után a fejlődés lelassult, csak családi házak épültek a parcellázással szerzett területeken.

De fejlődött az idegenforgalom és a turizmus is, főleg az erdei kisvasút a lillafüredi Palotaszálló és a Miskolc-Eger országút megnyitása után. Most már, ezen is megközelíthető lett Diósgyőr Eger irányából.

1951-ben Diósgyőr összeépült Miskolccal és annak harmadik kerülete lett. A két település közötti különbség így megszűnt, de Diósgyőr gondosan őrzi néhány fontosabb történelmi emléket

Ezek:

- A vár,
- Déryné háza
- Diósgyőr – Tapolca barlang / benne szauna/
- erdész ház,
- török mogyoró fa
- vár-strandfürdő
- Blaha Lujza u 32.számú ház / mint a vár gazdasági épülete/
- református templom
- római katolikus templom a Mária szoborral
- pálos kolostor
- papírgyár.

## HUNGARLANDAJ EKSKURSOJ

### Mallonga historio de Diósgyőr: La fortikaĵo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

#### Dua parto

La malgrandan vilaĝeton en ombro de la grandioza fortikaĵo situantan menciis la priskriboj unue en la jaro 1248-a, kiam ties nomo estis Noggeur / Nova Győr/ kaj reĝa bieno. En la jaro 1366 ties nomo estis jam Disgwr, sed en 1704 en hungarlingva ĉarto estis Diós Gyür. En la 19-a jarcento iĝis ĝenerale akceptita la nomo Diósgyőr.

Afabla historio de verkisto Mihailo Tompa pri la sonĝo de Paŭlo Diós/ diós: juglanda/ , kiu dum lia trezorserĉado trovis la pejzaĝon kulturita kaj riĉa. Nature la historio nur legendo estas. La loĝantoj de la vilaĝo laboris en servo de havantoj de la fortikaĵbienoj. La laboristoj estis plie nenihavantaj servutuloj. Dumtempe la loĝantoj iĝis pli kaj pli riĉaj civitanoj, kaj ili venis en kontraŭecon kun la posedantoj de la vinberejoj kaj fruktarbaroj, kun la paŭlanaj monaĥuloj.



La loĝantaro tre suferis post la batalperdo, granddanĝero de Mohács, ĉefe pro la avida kaj kruela ekspluato de sinjorino Sigismundo Balassa: Borbála Fánchy.

En la 18-a jarcento la fortikaĵon kaj bienon posedis la Kronlatifundio. La loĝantaro ekde tiam pli da laborebleco havis. Kaj en la vilaĝo kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo instalas arbarkulturo, vitro- kaj ferfabriko, malfrue paperfabriko kaj seguzino.

Sed agosfero de la Kronlatifundio iom post iom

malkreskis. Ties lasta reprezentanto, estis sinjoro Déry, (edzo de la fama hungara aktorino Roza Széppataki).

La proksimeco de urbo Miskolc kaj la konstruiĝo de la ferfabriko prosperigis la vivon en Diósgyőr komence de la 20-a jarcento. Vilaĝdomo, lernejoj estis konstruitaj, oni aĉetis ejon por banejo kaj efektivigis ankaŭ la tramlinio.

Post la unua mondmilito la plua evoluo malrapidiĝis, nur familiaj domoj estis konstruitaj sur la parceloj. Sed, evoluis ankaŭ la fremdultrafiko, la turismo, ĉefe la vojaĝo per la arbara vagonaro, post la malfermo de la lillafüreda Palachotelo kaj tiu de la landvojo inter urboj Eger kaj Miskolc. Diósgyőr iĝis pli facile alproksimigebla el direkto de urbo Eger.

En la jaro 1951 Diósgyőr kunkonstruiĝis kun urbo Miskolc. Tiel ĝi ĝis ties tria distrikto La diverseco inter la du kolonioj ĉesis, sed Diósgyőr zorge gardas siajn kelkajn signifajn historiajn monumentojn.

Ili estas:

- La fortikaĵo
- Domo de sinjorino Déry
- Diósgyőr – Tapolca groto / en ĝi saŭno/
- Arbarista domo- turkavelarbo
- Fortikaĵa strandbanejo
- La domo numero 32-a en strato Blaha Lujza / kiel latifundia domo /
- kalvinana preĝejo
- romkatolika preĝejo kun skulptaĵo de sankta Maria
- paŭlana klastro
- paperfabriko.

László Pásztor

## **A telitalalat**

A 20. század elején történt, hogy az apától iskolás fia megkérdezte csevegésük, közös játszadozásukkor:

- Apu, igaz, hogy a majomtól származunk?

Az apa meglepődött. Nyelt egy nagyot, aztán mégis kivágta a választ:

- Én nem, de Te minden bizonnyal!

Pásztor Lászlóné

## **Trafa respondo**

Komence de la 20-a jarcento okazis, ke iu knabo, lernanto demandis sian patron: „Ĉu oni pravas, ke ni devenas de la simioj?”

La patro surpriziĝis. Lasis li la ludon. Nek la flankenmetitan gazeton li ne manprenis.

Iomete pensadis, poste firme respondis:

„Mi neniel, sed vi certe jes!”

Lászlóné Pásztor

## **Újévi Koncert**

A miskolci Nemzeti Színházban 2006.január 6,7,8-án a Miskolci Szimfónikus Zenekar újévi koncertet adott.

Vezényelt: Kovács László.

Műsor: Híres operaáriák és kedvelt operettek, keringők, polkák, indulók.

MINAP c. miskolci heti újság

## **Novjara koncerto**

La 6-an, 7-an, 8-an de januaro en 2006, Miskolca Simfonia Orkestro novjara koncerton prezentis en Miskolc urba Nacia Teatro.

Direktis: sinjoro László Kovács.

Li metis sur programon: famajn operariojn, ŝatatajn operetojn, valsojn, polkojn kaj marŝojn.

s-ino Lászlóné Pásztor

## **Az első baba**

Miskolcon született meg a 2006- os év első babája!

Szankó Dominika Valéria, mint családjának első gyermeke 2550 gr –al és 50 cm-es hosszal jött a világra. Ő és 19 éves édesanyja jól vannak. Ő 5 perccel korábban született a budapesti babánál.

Az újszülött babát és édesanyját a kórházban felkereste Miskolc polgármestere és ajándékot vitt részükre. A város és a BAZ- megye 50000 – 50000 forintos ajándékját és azon kívül a „Bébi – Kötvény” okmányait is.

2006.január 1-től az állam minden gyermeknek 40000.-Ft támogatást nyújt. Melyet csak 18 éves kora után vehet fel a tulajdonos. A számla végösszegét csak hasznos célra fordíthatja, pl: tanulmányi, lakhatási, pályakezdési, gyermekvállalási...stb célra.

A MINAP c.miskolci heti újság alapján: Pásztor Lászlóné

### **La unua bebo**

La unuan de januaro en urbo Miskolc naskiĝis la unua bebo de la 2006-a jaro. Dominika Valeria Szamkó, kiel unua infano de sia familio kun 2550 gramoj kaj kun 50 centimetraj longeco naskiĝis. Ŝi kune kun patrino fartas bone. Ŝi naskiĝis per 5 minutoj pli frue, ol la budapeŝta bebo.

La novnaskitan bebon kaj la patrinon en la hospitalo vizitis urbestro de Miskolc, kaj portis por ili donacojn. Tiuj estis: 50000 – 50000 hungaraj forintoj de BAZ departementoj kaj de urbo Miskolc. Ili krom tiuj ricevis ankaŭ la dokumentojn de la tn: „Bebo –Poliso”.

La ŝtato por Ĉiuj novnaskitoj donas 40000.- hungarajn forintajn apogon por unufojon. Sed la finsumon de la konto la plenkreskintaj posedantoj uzeblas nur post la 18-a jaraĝo, kaj nur al bonutila celo. Ekzemple al: studo, loĝejo, karierkomenco, aŭ al surprono de infano...ktp

Laŭ - Minap - titola miskolca semajna gazeto: s-ino Lászlóné Pásztor

### **Visszatekintés a 2005 decemberi eseményekre**

2005.december 22-én adták át a kis kápolnát Miskolcon a Megyei Kórház területén. A kápolnában négy egyház papjai szolgálják Istent lelki segílyt nyújtva a szenvedőknek, reményt elvesztetteknek, értük imádkozva

### **Ioma rerigardo sekvas nun, kio okazis en decembro de 2005**

La 22-an de decembro oni transdonis la malgrandan kapelon por Diservo, sur la teritorio de Borsod-Abaúj-Zemplén departementa Hospitalo en urbo Miskolc. La kapelon pastroj de kvar religioj uzas por preĝi kaj konsolon doni por la suferantaj, aŭ por la malesperiĝintaj malsanuloj. kaj por iliaj parencoj, preĝante por tiuj.

### **A Fogyatékosok világnapja**

2005.december 3-án a miskolci „Király Lajos” Eszperantó Baráti Kör megemlékezett a Fogyatékosok világnapjáról.

Az előadó Pásztor Lászlóné arról beszélt, hogy a fogyatékkal élők is a mi társadalmunk tagjai, nekik is joguk van a normális emberi élethez.

## **Mondotago de la handikapuloj**

La 3-an de decembro 2005 la miskolca „Király Lajos” EAR memoris pri Monda Tago de Handikapuloj. La prelegantino Lászlóné Pásztor parolis pri tio, ke ankaŭ la handikapuloj estas plenrajtaj anoj de nia socio. Ankaŭ ili havas rajton al la normala, homa vivo.

## **Zámenhof ŝületésnapja**

2005. decembro 3-án emlékezett meg Pásztor László Dr. Zámenhof 146. ŝületésnapjáról / 1859. decembro 15-ről / . Ő alkotta meg az Eszperanto nyelvet, mely az emberek közötti megértés eszköze lett. Az ünnepség a miskolci „Őszi Napsugár” Szociális otthonban zajlott le, ahol a termet Parkánszkiné, Gerő Zsuzsanna biztosította a csoport számára. Az ünnepség után az összegyűltek évbúcsúztatót tartottak, megemlékezve ünnepeinkről, eddigi tevékenységünkről. Beszélgettünk jövő évi terveinkről.

Pásztor László

## **Naskiĝtago de Zámenhof**

La 3-an de decembro László Pásztor memorigis la kunvenintojn pri la 146-a datreveno de naskiĝo de D-ro L.L. Zámenhof, kiu naskiĝis la 15-an de decembro 1859, kaj estis la kreinto de tiu internacia lingvo, kiu iĝis ilo de la kompreno inter la homoj, popoloj. Por la festo la ejon en la „Aŭtuna Sunradio” Sociala Hejmo certigis S-ino Suzana Gerő, Parkánszki. Post la festparolo la kunvenintaj gesamideanoj adiaŭis la jaron parolante pri niaj festoj, pri nia ĝisnuna agado kaj pri la sekvontjara laborplano de EAR. „Király Lajos”.

László Pásztor

## **Abaújszántó sikere**

A „Király Lajos” Eszperanto Baráti Kör 2005. október 8-i abaújszántói Dr. Kalocsay Kálmán emléknep rendezvényéről az Ondo de Esperanto című oroszországi kiadású eszperanto nyelvű újság megemlékezett.

2005. október 8-án Abaújszántón Dr. Kalocsay Kálmán eszperantista költő 114. ŝületésnapja alkalmából a helyi posta alkalmi bélyegzést használt. A résztvevőket fogadta és vendégül látta Soltész Zoltán polgármester.

/ Északmagyarországi Hír alapján/  
/La Ondo de Esperanto – újság 12.szám 2005-ben/

## **Sukceso de Abaújszántó**

Pri la 8-a de oktobro 2005-a - memortago D-ro. Kálmán Kalocsay - aranĝita de „Király Lajos” Esperanto Amika Rondo en urbo Abaújszántó, rememoris la gazeto „La Ondo de Esperanto”, kion oni eldonas en Kaliningrad, en Rusio:

„La 8-an de oktobro 2005 en Abaújszántó/ Hungario/ okaze de la memorkunveno pri la 114 – a naskiĝdato de la E-poeto Kálmán Kalocsay, la loka poŝto uzis porokazan stampon, la partoprenantojn akceptis kaj regalis la urbestro Zoltán Soltész.

/laŭ Nordhungaria Informo/

/La Ondo de Esperanto – gazeto 12.numero en 2005./

## **Zamenhof est Szolnokon**

2005.december 12-én 17-19 óráig a miskolci „Király Lajos” Eszperantó Baráti kör nevében a Pásztor házaspár megjelent Szolnokon a „Barátság” Eszperantó Kulturális Szövetség által szervezett Zamenhof esten: a szolnoki Vasutas Művelődési Házban.

A rendezvényen először Eszényi József méltatta Zamenhof érdemeit, aki megalkotta a nemzetközi megértés eszközét, ezt a szép dallamos nyelvet.

Ezután Vas-Szegedi Julianna ismertette néhány költeményét.

A megemlékezéshez még hárman csatlakoztak.

Az ünnepi beszédek után kötetlen, baráti beszélgetés alakult ki, melynek végén a résztvevők pezsgővel köszöntötték egymást és kellemes Karácsonyt és boldog új esztendőt kívántak egymásnak.

Az egész összejövetel nagyon hangulatos volt.

Jól éreztük magunkat. Köszönjük az együtt töltött kellemes órákat mindnyájuknak.

Pásztor Lászlóné

## **Memorfesto Zamenhof en urbo Szolnok**

La 12-an de decembro 2005, inter 17-19 horoj: en nomo de Miskolc urba „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo / la Pásztor geedzoj partoprenis Zamenhof memordesperon de la Szolnok urba „Amikeco” Esperanto-Kultura Asocio. La geedzoj alvenis jam antaŭtagmeze en la urbon. Jozefo Eszényi montris la urbon por ili, poste li iris labori. Denove ili renkontiĝis dum la festa Zamenhof rememoro.

La memordespero okazis en la Fervojistia Kulturdomo inter la 17-19 horoj, en la tuja apudeco de la fervoja stacidomo.

Dum la memordespero unue Jozefo Eszényi honoris la meritojn de L.L. Zamenhof, kiu kreis nian belsonan internacian lingvon, la ilon de la interhoma kompreniĝo, Esperanton.

Post lia parolo Julianna Vas-Szegedi sekvis, kiu prezentis kelkajn el siaj poemoj. Post ŝi tute nature ankoraŭ tri gesamideanoj alparolis.

Post la festparoloj sekvis senpera amika babulado, je kies fino la ĉeestantoj manĝeblis dolĉajn tortopecojn aŭ salajn, fromaĝajn pogaĉojn, trinkis senalkoholajn -kaj laŭ elekto ankaŭ alkoholajn trinkaĵojn, aŭ manĝis oranĝon, kiujn la kunvenintoj prezentis unu al la alia.



Adiaŭante de la amika societo, ni trinkis ĉampanon je ĉies sano dezirinte la plej bonajn por la nova jaro unu al la aliaj.

Ni bone sentis nin en ilia rondo. Ni dankas kaj la inviton, kaj la donaclibrojn de Vas – Szege-di Julianna, la „Brilantaj Steloj” titolajn. Tiuj enhavas vere bonajn verkojn ne nur de ŝi, sed ankaŭ de aliuloj, kiuj vere brilantaj steloj estas sur la ĉielo de Esperantio.

Tiujn eldonaĵojn ni proponas legi al ĉiuj gesamideanoj en granda Esperantio. Vi povas mendi ilin de S-ro Jozefo Eszényi, delegito de UEA, el urbo Szolnok, Hungario.

Lászlóné Pásztor

### **Zámenhof est Debrecenben**

Meghívást kapott a miskolci „Király Lajos”EBK Debrecenbe is, 2005.december 13-án 17-19 óráig tartó Zámenhof estre, melyre sajnos, a késői kezdet és a rossz közlekedési viszonyok miatt nem tudott közülnök senki sem eljutni. Ezúton fejezzük ki sajnálatunkat azt elmaradt találkozó miatt.

### **Zamenhof vespero en Debrecen**

Nia Esperanto-Amika Rondo ricevis invitilon ankaŭ el urbo Debrecen, por partopreni Zamenhof-feston kune kun la tieaj gesamideanoj. Bedaŭrinde, pro la malfrua tempo, malfavora vetero kaj pro la ne kontentigaj trafikaj eblecoj neniu povis tien vojaĝi el inter ni, por partopreni ilian certe tre belan Zamenhofan feston. Ni esprimas nun al ili nian bedaŭron, pro la forrestinta renkontiĝo.

Lászlóné Pásztor

### **Zámenhof ünnep Budapesten**

2005.december 17-én nagysikerű Zámenhof ünnepséget tartottak Budapesten a MESZ részvételével. Ezen, más elfoglaltság miatt a „Király Lajos EBK tagjai nem tudtak – sajnós-résztvenni. Ezúton gratulálunk.

### **Zamenhof festo en Budapeŝto**

La 17-an de decembro 2005 kun partopreno de HEA, la gesamideanoj aranĝis. grandsukcesan Zamenhofan feston. La anoj de „Király Lajos” EAR pro alia okupiteco bedaŭrinde ne povis ĉeesti,. Ni gratulas nun pro la aranĝo.

Lászlóné Pásztor

## **Áhítat és készülődés**

A Miskolc városi görög katolikus templomban volt látható 2005. december 12-én hétfőn a könnyező szűzanya képe, melyet évenként több száz zarándok szokott felkeresni. A szent kép előtt a máriapócsi kegytemplomban 1991-ben II. János Pál pápa végzett liturgiát. Az ikont karácsony előtt bemutatták Sátoraljaújhelyen, Tokajban, Encsen és Edelényben is. Hétfőn érkezett Miskolcra, de két nap múlva vitték tovább Budapestre. Hétfőn du. 4 órakor katolikus szentmisét, majd este 6-kor ünnepi szent liturgiát tartottak a miskolci Búza-téri görög katolikus templomban. Egyébként a város lakói már hetek óta áhítattal készültek a közeledő ünnepre. A sétáló utcán/ Széchenyi u / készített betlehemi szimbólumok előtt sok ember megállott, pénzt és papírra írt imákat tettek Jézus jászoljába. A fő utcán felállított sátrak, és az ünnepi rendezvények hasonlóan ösztönözték a vallásos és nem vallásos embereket. A hét végén a villamosok megállottak, amíg Mikulás apó áthaladt a főutcán.

## **Pieco kaj prepariĝo**

En la greka katolika preĝejo de placo Búza en urbo Miskolc estis videbla la 12-an de decembro 2005 la bildo de larmanta virgulinpatrino, kion ĉiujare multcentoj da pilgrimantoj kutimas viziti. Antaŭ la sankta bildo en preĝejo de vilaĝo Máriapócs en 1991, la papo, Johano Paŭlo la II-a faris liturgion. La ikonon antaŭ Kristnasko oni prezentis kaj en urbo Sátoraljaújhely, kaj en urboj Tokaj, Encs, Edelény. Lunde ĝi alvenis en Miskolc, sed post du tagoj oni portis plu al Budapeŝto. Lunde posttagmeze je la 4-a horo oni faris romkatolikan meson, vespere je la 6-a horo sankta liturgio okazis en la Búza-placa greka katolika preĝejo. La loĝantoj de la urbo – pretiĝis al la festo. Antaŭ sur la promenada strato /Széchenyi/ faritaj betlehemaj simboloj multe da homoj ekhaltis, monon kaj surpaperigitajn preĝojn metis en kripion de Jesuo. Sur la ĉefstrato starigitaj tendoj/kun diversaj varoj/, festaj aranĝaĵoj same inspiris la religiemajn kaj la nereligiajn homojn. Fine de la semajno ankaŭ la tramoj haltis, dume avo Nikolao trairis la straton.

László Pásztor

## **Vas - Szegedi Julianna: Bölcs Mondások**

A mosoly, amelyet küldesz, visszatér hozzád.

/ Indiai bölcsességek /

La rideto, kiun vi sendas, tiu revenos al vi.

/ Hindaj saĝecoj/

A valódi boldogság a megélt harmónia.

/ Karl Heinz Jaeckel/

La vera feliĉo estas la ĝisvivita harmonio.

/Karl – Heinz Jaeckel/ „Brilantaj Steloj” 2004/

## **Teodor Andreas: Ünnepi vidámkodások**

Az igazságot megtalálni gyerekjáték ahhoz képest, hogy milyen nehéz utána eltitkolni

## **Teodor Andreas: Festaj viglecaĉoj**

La verecon ektrovi pli facila estas, ol sekretigi ĝin poste

Ahhoz, hogy az emberi kicsinyességnek és butaságnak legyen hova férnie, a világ-egyetemnek folytonosan tágulnia kell.

Por tio, ke la homa malgrandanimeco kaj stulteco havu sufiĉan ejon en la mondo, la univerzo devas daŭre etendiĝi.

Mielőtt bekapcsolsz egy gépet, tudd meg a szerelő telefonszámát és a tűzoltókét.é

Antaŭ ol enŝalti maŝinon, informiĝu pri telefonnumeroj de la muntisto kaj de la fajrobrigadanoj.

## **Miskolc finnországi testvérvárosából Tampereből írta Sylvia Hämäläinen:**

2005.december 6-án volt Finnország függetlenségének 88. évfordulója.

Akkor Helsinkiben a kormány székhelyén nagy ünnepi fogadást adott a mi köztársasági elnökünk Tarja Halonen a férjével.

Ebben az évben 1800 vendéget hívott meg különböző területekről, pl: a kormány tagjait, háborús veteránokat, diplomatákat, püspököket és más képviselőit is az egyházaknak, sok művészt és egyéb személyt akikkel ő a belföldi sok utazása során találkozott.

Majdnem kettő órán át tartott a fogadás, melyen minden vendéggel kezet fogtak.

Utána tánc következett egy szörnyű szűk helyen, az ember nem is beszélhetett táncolásról, csak valamilyen fajta oda – vissza ingásról. De a legérdekesebb az volt, amilyen ruhákat a hölgyek viseltek.

A TV riporterek sokat bemutattak a vendégek közül név szerint. Volt speciális riporter is, aki ismerte a megjelent néhány ruhatervező művészt és a divatot is.

Finnország három órára a TV készülékek elé volt „ragasztva” 2005.december 6-án.

Fordította: Pásztor Lászlóné

## **El finnlanda fraturbo de Miskolc, el Tampere skribis s-ino Sylvia Hämäläinen:**

„ La sesan de decembro estis la 88-a jubilea jara datreveno de sendependiĝo de Finnlando.

Tiam okazas la festa akcepto de la respublika prezidento, nun s-ino Tarja Halonen kun edzo en la rezidejo en Helsinko.

Ĉijare ŝi invitis 1800 gastojn el diversaj fakoj, ekz. la registaron, militveteranojn, diplomatojn, episkopojn kaj reprezentantojn de diversaj eklezioj, multajn artistojn kaj personojn, kiujn ŝi renkontis dum siaj multaj vojaĝoj en la lando dum la jaro.

Preskaŭ du horojn daŭris la akcepto de la gastoj, kiam la gastigantoj mansalutis ĉiujn gastojn. Poste dancado okazis en terura malvasto, oni preskaŭ ne povis paroli pri dancado, okazis nur iaspeca svingiĝado ien kaj reen. Sed, la plej interese estis kiajn robojn la virinoj portis. La Tv-raportistoj prezentis multajn el la gastoj laŭnome kaj estis speciala raportisto, kiu konas la modon kaj la artistojn de kelkaj roboj. Tri horojn Finnlando surgluita estis antaŭ la televidaparatoj vespere la 6-an de decembro en la 2005- a jaro.”

### **Tudja-e?**

Hogy a miskolci Herman Ottó Múzeumban van az ország legteljesebb, mintegy 17 ezer darabból álló ásvány gyűjteménye?

### **Ĉu vi scias?**

En urbo Miskolc, en muzeo Otto Herman troveblas la plej kompleta kolektaĵo /17 miloj da pecoj/ de la patrujaj mineraloj

### **Tudja-e?**

Hogy 2005. évben ünnepelte a 80. születésnapját Farkas-Tatár Éva eszmetársnő,  
A 85. születésnapját Dr. Jáki Ferenc eszmetársunk?  
Mindkettőjüknek és finn eszmetársainknak is ezúton gratulálunk a nevezetes évfordulójuk alkalmából, Beethoven : Öröm Óda c. művével

### **Ĉu vi scias?**

Nia eminentulino Eva FarkasTatár -kune kun geamikoj – en la jaro 2005-a festis sian 80-an naskiĝtagon, kaj samideano D-ro Ferenc Jáki - esperantista poeto kaj prezidanto de la landa E-Ekzameniga Komitato – festis sian 85 –an naskiĝtagon kune kun liaj parencoj kaj geamikoj.  
Ni nun gratulas al ili ambaŭ, krome ankaŭ al la finnlandaj gesamideanoj por ilia grandsignifa okazintaĵo per la „Odo de Ĝojo” de Beethoven, per tekstotraduko de s-ino Eva, Farkas – Tatár.

# HIMNO DE ĜOJO

27

Traduko de  
Eva Farkas-Tatár

El la 9-a simfonio  
de Beethoven

Go - jo, be - la di - a lu - mo

Vi, fi - li - no de l' ĉi - el, Al vi

ve - nas nun a - dep - toj Por sa - lu - ti

kun fi - del'. Vi mi - rak - le li - gas

ku - ne di - vi - di - tojn de la sort', Fra - toj

es - tos ĉi - uj ho - moj Ki - ujn tu - ŝas vi - a

fort' Vi mi - rak - le li - gas ku - ne

di - vi - di - tojn de la sort' Fra - toj es - tos

ĉi - uj ho - moj Ki - ujn tu - ŝas Vi - a fort'.

(Turista énekek / Turista kantaro)

## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László 3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Retpošto / E-Mail: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)

Weblap / Retpaço: <http://members.chello.hu/pasztor.laszlo4>